Jaro V/IX. N-o 6 (54) Marto 1928



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

EDUKADA SERIO

ENHAVO:

PEDAGOGIAJ TAGOJ DE EDUKINTERN

Redakcia Angulo. — *M. Van de Moortel:* Semajno de Edukintern en Leipzig. — Celo de l' Edukado. — *Célestin Freinet:* La problemo pri lerneja disciplino. — *Edukintern:* Statutaro. — *M. Boubou:* Internacio de l' Eduklaboristoj (rapida historia skizo). — *L. Vernochet:* De Bordeaux ĝis Leipzig, okjara laboro. — *T. Oki:* Situacio de prolet-infanoj en Japanio kaj Ĉinio.



Redakcio: 14, Avenue de Corbéra, Paris, XII-e (Francio)
Administracio: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

Flanke de la Kongreso estos organizata internacia ekspozicio pri lernejaj materialoj, libroj kaj laboroj. Multaj instruistoj loĝantaj en Leipzig amike proponis loĝigi la alilandajn gastojn, kiuj venos la kongreson je siaj propraj elspezoj.

Ni povas anonci, ke D-ro *Max Adler* (Vieno) partoprenos kaj raportos pri "Celo de l' Edukado". Ankaŭ K-do *Viktor Stern,* direktoro de la Laborista Universitato el Vieno, kunlaboros al Pedagogiaj Tagoj.

Tiom en la edukistar-amasoj, kiom en la rondoj de plej eminentaj pedagogoj jam longe eĥis la anonco de nia Leipziga Konferenco. Unuiĝo de Nederlandaj Instruistoj (Amsterdama sindikato ankoraŭ ne aliĝinta al Edukintern) decidis delegi K-dojn *C. Moerman* (Hilversum) kaj *Van der Sluys* (Rotterdam).

La listo de niaj raportontoj prezentas duoblan garantion: veran internaciecon kaj tutan proletecon.

Krom la tre diverslandaj kompetentuloj ĉi supre nomitaj, sendube venos kunlaborantoj el Skandinavio kaj Aŭstrio; interrilatoj kaj klopodoj ankoraŭ daŭras tiucele. Ĉiuj eŭropaj ĉeflandoj estos reprezentataj, krom tiuj, kie reganta faŝismo malhelpas ĉian ajn kunlaboron de edukistoj kun proletorganizo. Azio estos reprezentata kaj kredeble venos ankaŭ reprezentantoj el ambaŭ Amerikoj.

Flanke de konataj pedagogoj-fakistoj estos ĉiugradaj edukistoj apartenantaj al sindikatmovado konstante rilatantaj kun proletinfanoj kaj ankaŭ kun proletoj maturaĝaj. Do, scienca karaktero de la debatoj estos akompanata de certa praktika socia karaktero.

En Leipzig, la unuan fojon en historio pedagogia, internacia organizo de edukistoj, batalantaj flanke ĉe flanke kun laboristara klaso, ekzamenos laŭ internacia plano la ĉefajn demandojn pri edukado.

Edukistoj el tutmondo elkomprenu tiun gravan signifon kaj multnombre venu al Leipzig je venonta Pasko.

Maurice Van de Moortel
pedagogia sekretario de Edukintern

Noto: Turnu vin al sekretario de loĝ-komitato: K-do *Herman Strobel,* Hartmannstrasse 37, Leipzig N 22.



Celo de l'Edukado

Kelkaj tezoj prezentotaj dum Pedagogiaj Tagoj en Leipzig

Lernejo kaj Ŝtato: *Resumo de raporto de Ŝulgin (Moskvo)*

Estas neeble, imagi Ŝtaton en burĝa socio, kiu neinteresiĝus pri edukado. Estas neeble, forpreni lernejon el influo de socia medio.

En kapitalismo, edukado servas burĝan ordon kaj unika lernejo (unusistema, enirebla de ĉiuj) ekzistas nenie. La "novlernejoj" akceptas nur infanojn de burĝaro. Duagradaj lernejoj, vizitataj de burĝidoj, estas pli monzorgataj ol popollernejoj kaj malmultaj proletidoj vizitantaj duagradan lernejon estas forprenataj de proletklaso.

Profitema burĝaro ne deziras doni veran edukadon al *tuta* popolamaso. Ĝiaj programoj, lernolibroj, metodoj, disciplino estas saturataj de konservativemo plejofte religia.

En USSR oni difinas al edukado jenan celon: formi batalantojn por idealo de laborista klaso. Utilas al USSR, ke ĉiuj infanoj ricevu plejeble vastan edukadon, ke unika lernejo efektiviĝu. Tial la programoj baziĝas sur

Marx'ismo kaj Darwin'ismo, la metodoj devas celi formadon de agemaj individuoj kaj baziĝi sur laboro. La diversaj nacioj (naciaj malplimultoj) estas instruataj en sia propra nacilingvo.

Tial, la priedukaj postuloj de Soveta Ŝtato pli bone ol tiuj de burĝaro respondas al naturo de l' infano.

Lernejo kaj Socio: *Resumo de raporto de Pistrak (Moskvo)*

Rilatoj inter Lernejo kaj Socio, jen demando nun staranta en du socioj precipe kontraŭaj: Kapitalistio kaj Sovetio. Respondo dependas de socia strukturo mem.

Kapitalisma reĝimo sin mem konsideras eterna, kiajn ajn modifojn priformajn evolucio al ĝi alportu. Ĉiu ideo kontraŭa je tiu tezo estas forpelata el lernejo. En tiuj limoj burĝaro permesas iun filozofian kaj pedagogian eklektismon (metodo kombinanta pli taŭgajn sistemojn per kompilo kaj elekto en antaŭaj sistemoj).

Kontraŭe, sovetia sistemo de proleta diktaturo sin konsideras nur provizora, batalas kontraŭ potencojn de Malnovo, volas direkti la sociajn okazaĵojn en difinita vojo.

Kapitalisma lernejo ne por ĉiuj egala, religiema, instruas al popolamasoj kontentiĝi per malmulto kaj estas devigata pli kaj pli forlasi sian *edukan* taskon kaj limigi sian agadon al nur *instruado*. Eksperimentaj lernejoj aŭ submetiĝu je la burĝsociaj postuloj aŭ malaperu, sed ĉiuokaze ili tre malmulte influas popolamasan lernejon. Do je pedagogia vidpunkto, burĝlanda lernejo troviĝas en senelirejo.

Soveta socio posedas unikan lernejon, ĉar egalan por ĉiuj kaj unikcelan. Tiu lernejo sin adaptas al la vivcirkonstancoj kaj lernantoj elirantaj el ĝi devas esti kapablaj labori por socia transformo: ĝi estas lernejo kun dinamika sinteno. Soveta Ŝtato kreis multajn ekspriméntajn lernejojn, kiuj neniel malsamas de l' aliaj rilate socian celon sed penas esplori programojn, lernolibrojn, metodojn... por efektiva kaj ĝenerala apliko al lernejo de l' amasoj.

Problemo de rilatoj inter Lernejo kaj Socio estas solvita en Sovetio ne per pedagogia agado, sed per socia batalo.

Taskoj de l' instruista avangardo en kapitalistaj landoj estas: batali kontraŭ religia instruado — batali por sendependeco de lernejo — agiti por grandigi helpon de la gepatraj amasoj — kaj ĉefe batali kontraŭ kapitalisma reĝimo kaj por orientigo de lernejo al socia batalo.

Celo de Edukado: *Resumo de Raporto de Redgrove (Britio)*

Celo de vera edukado estas *feliĉo*, sed ĝi estas duobla, laŭ tio se oni konsideras: 1. feliĉon de la individuo; 2. feliĉon de la kolektivo. La unua celo estas nomita: *Kulturo*, la dua: *profesia* aŭ *socia eduko*.

Diversaj instrufakoj (ekzemple fiziologio kaj korpa kulturo) havas valoron samtempe kulturan kaj profesian. Ĉar edukado devas liveri feliĉofontojn, estas nepre necese konsideri en edukado la naturajn emojn de l' infano (ekz. guston al artoj). Profesia kaj socia edukado havas duoblan celon: formi bonan laboriston kaj formi bonan civitanon.

Tial, ĉiu infano devas plenkoni la teknikon de iu metio kaj la sciencajn principojn. kiuj estas ĉe ties bazo. Ankaŭ tre grave estas, ke li konu la principojn de sindikalismo kaj teknikon de l' organizado.

La "civitaneco" (citizenship) devas esti enkondukata, kiel instrufako kaj tre gravas, ke laboristo perfekte konu ĉi sciencojn inter si intime ligatajn: historio, ekonomio kaj sociologio.

La problemo pri lerneja disciplino

CÉLESTIN FREINET

Tiun raporton prezentos dum "Pedagogia Semajno" en Leipzig nia kompetenta K-do C. Freinet, kiel oficiala raportanto de Edukintern.

I. BAZOJ DE DISCIPLINO

a) **Trudema disciplino** — Disciplino de tradicia lernejo estis — kaj restas, kiaj ajn estu ĝiaj nunaj formoj — disciplino esence premega, kontraŭa je l' korpaj, psikologiaj kaj sociaj bezonoj de la gelernantoj, kaj malhelpanta ilian veran edukon. Ĝi estu nepre forlasata. Ni ne provos enkodigi la rimedojn de ĝi disponatajn, nur montros eblajn etapojn al liberiga disciplino.

Ĝisnuna lernejo nek atentis la trafpovon edukan de la diversaj lernej-ekzercoj, nek la aktualajn bezonojn de l' infano. Tasko de l' instruisto estis nur inokuli en infancerbojn la sciaĵon, kiun maturaĝuloj agnoskis (rekonis) necesa kaj enkodigis en programojn. Necesis daŭre trudi al infano; sekve, instruistoj kaj lernantoj nepre malamikoj interkonfliktis ĉiumomente, instruisto por trudi, lernantoj por sin defendi.

En tiu lukto, la korpopunoj havis longtempe la honorlokon (unuan), eĉ ankoraŭ havas! ĉar eĉ sen batoj, ĉu la elir-malpermesoj, starpunoj, puntaskoj ne estas korpopunoj pli hipokritaj, sed iafoje pli malutilaj?

Lernejo, same kiel socio, evoluis en demokratia direkto. Almenaŭ surpapere, oni forigis la korpopunojn, sed neniel trafis la kaŭzojn mem de la premego. Oni eĉ sin orientis al disciplino "liberala" (tolerema), t. e. oni "konsentis favore" iujn liberojn al infanoj, modifis la "formojn" de la premego. Oni starigis kelkokaze veran lernejleĝon — verkon de maturaĝuloj — kiu havigas al infanoj "liberecon-iluzion". Klasifiko de la lernantoj, rekompencoj kaj punoj estas ankoraŭ la ĉefaj principoj disciplinaj.

Trudema disciplino ankoraŭ plene aplikata de l' instruistoj daŭras prepari iom post iom sed certe la "liberalan" trudeman disciplinon de niaj demokratiaj socioj. Kamaradoj, vi komprenu, ke tiu transir-forma disciplino de niaj lernejoj, malgraŭ novaj formoj de lernejo, apartenas al stadio de trudema premega aŭtoritato, ĉar rilatoj inter instruistoj kaj lernantoj ĝis nun ne ŝanĝiĝis. Nur tiu ŝanĝo, bazita sur novaj psikologio kaj pedagogio povas solvi la nepran evoluon de disciplino.

b) **Fortoj de pasinta tempo** — Trudema disciplino fariĝas ofte nepre necesa pro la materialaj kondiĉoj de nuna Lernejo. Vera laboro de la lernantoj, ilia libera aktiveco postulas specialan organizadon de Lernejo, treege malsaman je nuna organizo.

Ne tro multaj lernantoj por unu instruisto, apartaj flegoj al nesufiĉe nutrataj kaj al neprogresintaj infanoj, puraj, bone lokitaj, aerumataj ejoj, materialo adaptita al la lernantoj kaj al speco de laboro — estas kondiĉoj nepre necesaj por starigi la novan disciplinon. La progresoj efektivigitaj en multnombraj bublernejoj montras la gravecon de tiuj ĉi materialaj kondiĉoj.

Oni neniam montros sufiĉe, ke nunaj lernejoj kun siaj tro altaj fenestroj, siaj karcer-benkoj, ke korpa stato de niaj lernantoj, ilia nutrado, familiaj vivkondiĉoj ofte malhelpas ĉiun provon pri liberala edukado.

Oficialaj programoj, lernolibroj, ĉiugradaj enciklopediecaj ekzamenoj estas ega baro je ĉia eduka progreso. Ekzamenoj ĉefe, kiuj sankcias ekskluzive lernakiron sen edukiva celo kaj postulas "cerban plenŝtopon", korpan intelektan moralan premegon, estas senkompataj gardantoj de trudema disciplino.

c) **Nova lernejorganizado** — La nova disciplino, kiun ni nomos nek liberala, nek eĉ perlibera, baziĝas sur kono de bezonoj kaj deziroj de l' infano kaj ankaŭ sur jena principo de nova pedagogio: "edukado ne povas esti afero nur ekstera, sed estas interna supreniĝo de l' individuoj mem; lernakiroj ne servantaj al tiu supreniĝo estas neutilaj kaj eĉ danĝeraj kaj kunhelpas al «misformado» de la lernantoj."

Nova disciplino estas pleje individuigita, kvankam ne individuista. Ĝi preparas en infano aktivan laboriston el harmonia socia grupo. Problemo de disciplino stariĝas jene:

a) "Organizi lernejan vivon tiel, ke lernantoj sentu bezonon kaj deziron fari edukivan socie utilan laboron."

b) "Ebligi materie la kontentigon de tiu bezono."

c) "Direkti tutan lernejan aktivecon al vera celo per organizado de lerneja komunumo meze de socio."

d) Kuraci korpe, intelekte, morale la lernantojn emantajn malorganizi la lernejan komunumon."

Oni multe parolis lastatempe pri libereco en edukado. Mallogikaĵo kaj burĝa iluzio, dum la ĉi supraj kondiĉoj pri nova disciplino restos neplenumitaj. Tuj senkuraĝiĝus instruistoj, kiuj dirus, kiel ĉefoj de demokratio: "Rigardu, kion ili faras, kiam ili havas kelkajn momentojn de libereco!"

Ni tute samopinias, kiel pedagogo *R. Cousinet* (Nova Edukado n-o 54): "Lasi la infanojn fari, kion ili volas, tute ne estas (kiel oni tiel ofte diris kaj skribis) lasi ilin fari ion ajn; *ĉar ili ne volas ion ajn.* Supozi, ke ili faras, kion ili volas, estas ankaŭ supozi, ke ili volas ion (sed ne ion ajn)."

Pedagogo J. Dewey diras en sia verko "Lernejo kaj Infano": "Disciplino estas nur tie, kie individuo libere kaj plene aplikas siajn kapablojn en aktiveco ekzercinda."

Tial organizi la lernejlaboron, igi Lernejon centro de l' infanvivo estas la ĉefa postulo de disciplino.

d) **Laboro en lerneja komunumo.** Memorganizado de l' infanoj kaj komunuma laboro kun socia celo estas bazo de nova disciplino. Kelkaj novaj metodoj ebligas tiun laboron kaj ilin ni enkonduku en niajn lernejojn. Ili estas: *Metodo de interescentroj de D-ro Decroly; Dalton-plano, Metodo de Winetka; Presado en lernejo kaj interlernejaj interŝanĝoj; Metodo de Cousinet pri libera laboro grupopa; rusa laborlernejo.*

II. FORMOJ DE DISCIPLINO

Pedagogo atentu ne konsideri la formojn, kiel ĉefaĵon en problemo pri disciplino. Formoj nepre evoluas laŭ politika socia medio kaj laŭ aĝo de lernantoj. Antaŭ ĉio gravas la bazo sur kiu konceptiĝas la lernejorganizado.

a) **Lerneja disciplino.** En niaj popollernejoj, preskaŭ ĉiuj ankoraŭ sub reĝimo de apenaŭ moderigita disciplino, oni tre interesiĝas pri formo kaj trafpovo de punoj kaj rekompencoj, klasifikado de lernantoj, disdonado de premioj, stimuligo kaj konkurigo, pri ĉio anstataŭonta la korpan premegon. Eraro bedaŭrinda. Kun novaj metodoj de lerneja laboro, ni uzu jenajn formojn de disciplino:

1. *Infanrespublikoj* — organizitaj de maturaĝuloj. "Tiuj infanorganizoj, diras Pistrak (en Fundamentaj Problemoj de Laborlernejo, eldono de Edukintern), celas en burĝa lernejo helpi la instruistojn konservi sian disciplinon; skurĝo kaj puniloj elglitas el instruistaj manoj dank' al "progreso de civilizeco" kaj estas anstataŭitaj de funkcioj komisiitaj al lernantoj en celo ŝirmi difinitan lernejordon."

Karakterizoj de tiuj respublikoj estas jenaj: firma aŭtoritato reprezentata de regularo rigore obeota de ĉiuj lernantoj, punaparato tre prema

similanta registar-aparaton de maturaĝuloj kun ĉefoj regantaj amason, laŭleĝa tribunalo kaj punkodo.

Tiu institucio estas ofta etapo sur la nova vojo, sed instruistoj pripensu, ke ĝi donas al infanamaso nur iluzion de liberala disciplino sub kies masko daŭras netuŝite la malnovaj eraroj.

2. *Lernejaj kooperativoj* — iniciatitaj en Francio de inspektoro *Profit.*

Ili insistas pri la nova spirito vivigonta lernejon kaj pri la leĝoj kapablaj regi lernejan kunvivon. Infanoj mem organizu la lernejon, ne nur la eksterajn formojn, sed eĉ la lernejlaborojn. Ili mem serĉu la necesan instrumaterialon kaj organizu tute vivon de sia lernejo. Instruisto ĉesas esti la tutpotenca mastro, li fariĝas kunlaboranto, konsilanto, amiko.

Se la instruisto ne regos per ordonoj, ne sklavigos la aktivecon de la lernantoj, la kooperativoj faros grandan paŝon sur vojo al nova disciplino.

3. *Lerneja komunumo* estas ideala formo de popollernejo bazita sur plena aŭtonomio, tuta memorganizado de lernantoj. Bonaĵojn de tiu reĝimo montris lernejaj komunumoj en Hamburg, en Odenwald, ktp.... kaj ĉefe en la rusaj lernejoj.

Anstataŭ regsistemo per ĉefoj kaj obeo deviga al rigora leĝaro reganta lernejon, la rusaj edukistoj provis starigi la *regadon de l' amaso per la amaso.* Por esti plenedukiva, lerneja komunumo estu efektive verko de l' infanamaso mem. Ĝiaj ĉefoj ne estu profesiuloj kapablaj konservi perfektan novan disciplinon aŭtoritateman. Eĉ se ordo iafoje forestas, ĉiuj komunumanoj devas lerni plenumon de rolo, kiel *aktiva* civitano. Gvidantoj estos nomataj de Ĝenerala Kunveno por mallonga tempo, plena kunveno ankaŭ juĝos kulpajn lernantojn. Edukistoj estos nur konsilantoj kaj amikoj.

Malnova disciplino preparis regatojn neprudente obeemajn al leĝoj aŭ potencoj, starigitaj ekster ilia volo. Nova disciplino devas ekzerci la infanojn memorganizi sian komunuman reĝimon, vivon kaj laboron.

b) **Ordo, silento, laboro.** Tiu nova koncepto pri problemo disciplina tute ŝanĝas la naturon de la rilatoj inter edukantoj kaj edukatoj; tiuj malamikoj fariĝas kunlaborantoj. Plej taŭga instruisto ne plu estos tiu, kiu timigas, silentigas siajn lernantojn, trudante al ili nepropran aktivecon sed proprajn dezirojn; li estos tiu, kiu kapablas *organizi la propran aktivecon de l' infanoj, engrupiĝi kaj vivi kun ili,* esti amata, aŭskultata respektata, kvazaŭ bona plejaĝa frato.

Edukistoj tiel ŝanĝu en si mem kaj en sia lernejo la sintenadon rilate disciplinon laŭ ĉi supra vojo. Silento kaj ekstera ordo ne estas kvalitoj de laboranta lernantaro, sed plejofte montras vivmankon. Kontraŭ tio, kion oni kredis dum longa tempo, silento kaj senmoveco ne helpas edukadon, nur aktiveco kaj vigla vivo estas kreivaj kaj vere riĉigas la infancerbojn.

Sed laboro ne signifas malordon aŭ senbridecon. Cetere vera aŭtoritato kaj influo de l' edukisto grave pliiĝos pro lia intima kunlaborado en la infanvivo. Lerneja moralo aspektos alia. Anstataŭ truditaj obeo, ĝeno, penado, kutimoj pri puremo, respektemo, stariĝos principo pri *superegeco de kutimo de l' utila laboro;* bonaj kutimoj pri higieno, laboremo, honesteco, kuraĝo, kunlaboremo estas certaj rezultatoj de nova disciplino.

c) **Personeco de l' edukisto.** Nova disciplino postulas ne nur konservon, sed kreskon de l' edukista persono kaj influo. Edukisto devas plejeble koni psikologion infanan. Rusoj diras: "Bazo, formo, enhavo de lerneja memorganizo estu tute klaraj al instruisto. Se li ne konas la etapojn de kreskado de la sociaj sentoj ĉe l' infanoj, li ne povas kaj ne devas enkonduki sistemon de memorganizo de lernantoj."

Oni studu la lernanton, observu lin vivantan, vivu kun li, aŭskultu lin parolantan por lin tutkompreni. Edukisto ankaŭ devas: 1. memregi siajn

nervojn (sian incitiĝemon) kaj devigi sin paroli ĉiam milde (nenio estas pli imitebla ol incitiĝemo); 2. neniam esprimi malbonajn sugestojn, ne moki la lernantojn kaj ĝuste taksi ĉies penadon; 3. labori kun la infanoj kaj montri al ili modelon de disciplinema sindonema aktiveco.

d) **Infanorganizoj ekster lernejo.** Ili tre helpas novan disciplinon, penetrigante en lernejon vivon, kooperemon kaj labordistribuon. Sed, ve, en kapitalistaj landoj estas nur *sportaj grupoj* (ĉefe piedpilkaj), en kiuj infanoj obeas la leĝon de luda partio.

Alia grava movado bedaŭre ne servas veran memorganizon de l' infanoj: *skoltismo*. En ĝi plej gravas unuflanke preparado de kleraj ĉefoj, aliflanke rigora obeo al skolta leĝo. Ĝi neniel estas proletareca kaj preparas soldate obeemajn civitanojn.

Pionir-movado en Rusio havas pli popularan kaj demokratian bazon. Ĝi ne preparas eliton por regi la amason, sed preparas la amason al politika vivo kaj aktiva kontrolo de ĉio komuna.

e) **Influo de familia socia medio.** Ĝi estas plejgrava, ĉefe en kapitalistaj landoj, kie socia medio malhelpas starigon de libera kaj laboriga disciplino. Tamen lernejo plej intime rilatu kun ĉirkaŭanta vivo. Gravas la helpo de gepatraj asocioj por eduka disciplina celo, sed en tio kuŝas delikata (embarasa) demando, kiu ankaŭ rilatas la edukadon de la gepatroj mem.

III. APLIKEBLAJ KONKLUDOJ

Eĉ en niaj kapitalismaj lernejoj estas eble sin direkti al nova disciplino kaj nova organizado de lernejlaboro. Tasko malfacila kaj sendanka, kontraŭata de socio, familio, programoj.

Tamen, Kamaradoj, ekiru la montritan vojon al pli intensa vivo lerneja per apliko de novaj metodoj — al lerneja kooperativo kaj komunumo celanta liberan socian lernejon.

Pri jenaj punktoj povas revoluciemaj edukistoj agadi por atingi pli bonan disciplinon:

a) *Programoj kaj lernolibroj* estu plibone adaptataj al la novaj labormetodoj.

b) *Ekzamenoj*, plej grava malhelpo al edukiva disciplino, kontrolas nur buŝan lernakiron kaj devigas instruistojn plenŝtopi infancerbojn kaj devas esti modernigataj per apliko de testoj.

c) *Klasifikado* de lernantoj, bazita sur konkuro, estu tute forigata.

d) *Redukto de infannombro* en ĉiu klasĉambro estu ĉiam kaj ĉiam pli laŭte postulata en nuna momento, kiam oni volas racionalizi (raciigi) eĉ edukadon.

e) *Specialaj lernejoj* por subnormaj aŭ neprogresintaj infanoj estu kreataj kaj efektiviĝu tute la medicina inspektado de la lernejoj.

f) *Urĝa plibonigo* de la lernejoj kaj instrua materialo estu postulataj, oni provizu la lernejojn per eksperimentaj kampoj por agrikulturaj laboroj, per laborejoj por metilernado kaj manlaboro.

g) *Ekskursoj-lecionoj* estu vaste praktikataj.

h) *Grupoj de prolet-infanoj* laŭ modelo de rusaj pioniroj estu kreataj.

i) *Novaĵoj pedagogiaj kaj psikologiaj* estu diskonigataj al edukistoj, ankaŭ novaj edukmetodoj, ĉefe labormetodoj de rusa popollernejo kaj ĝiaj disciplinoj.

j) *Socia kaj familia medio* estu decide prilaborata por fariĝi tute favora al edukado per liberigo de laboro kaj laboristoj.

INTERNACIO DE L'EDUK-LABORISTOJ

PARIS

STATUTARO

starigita dum Brusela kongreso (aŭg. 1924)

I. ENKONDUKO

1. En ĉiuj landoj, kie regas kapitalismo, tiu ĉi transformis la sciencon en varon, kiu estas atingebla de nur kelkaj personoj. La laborulaj amasoj tiel estas aŭtomate forpuŝataj el la kategorio de personoj, kiuj havas la eblon akiri la sciojn necesajn por organizado kaj direktado de la mastrumado ŝtata kaj edukada.
2. Lernejo de kapitalisma socio prizorgas antaŭ ĉio la profitojn de la posedanta klaso — unuaflanke, celante formi apartigitan tavolon el privilegiuloj kapablaj direkti la burĝan socion, firmigi funkciadon de ties organfakoj kaj respektigi ties prerogativojn — aliaflanke, celante tenadi la grandegan plimulton de la popolo en la stato de intelekte sklavigita amaso kaj de blinda instrumento de kapitalismo.
3. En tia socio, la geinstruistoj ne nur ne povas esti la portantoj de supera kulturo por la junularo, sed ankaŭ mem falas en intelektan dependecon rigardante al burĝa socio kaj transformiĝas en burokrataj oficistoj kaj dungitoj malbone pagataj je servo de kapitalo kaj ties ŝtato.
4. Liberigo de l' eduklaboristoj el ilia mizera situacio — tiel de materiala vidpunkto, kiel de intelekta — estas organece ligita kun liberigo de lernejo el sklavigo de kapitalismo kaj kun transformo de lernejo en vera kultur-laborejo por la tutaĵo homara. Nur socia revolucio estas kapabla krei lernejon liberan kaj edukistojn liberajn kaj samtempe liberigi la laborulajn amasojn. Nur la laborula klaso havas efektivan kaj daŭran intereson pri renovigo de la nunaj edukmetodoj.
5. Tiel la batalo de l' eduklaboristoj por plibonigo materiala kaj intelekta de ilia situacio povos efiki ne sub formo de batalo por akiri iujn privilegiojn interne de kapitalisma socio, sed nur sub formo de aktiva batalo por la socia transformo per kunlaborado kun organizita laborista klaso.
6. Sekve, la batalo de l' edukistoj ne devos esti direktata nur al akiro de ekonomiaj avantaĝoj kaj por la malvastaj profesiaj interesoj. Ĝi devos esti ankaŭ batalo kontraŭ la kaptemo de l' ideologio kapitalisma en lernejo, ĉefe kontraŭ la ŝovinisma kaj imperialisma laŭdego de milito, kontraŭ la klerikaligado de lernejo kaj por la solidareco de la laboristaj amasoj sendistinge pri raso kaj nacianeco.

   La batalo de l' edukistoj devos esti ligata kun la batalo por radikala transformo de l' instruado, kiu ebligu ĉiujn eduk-instituciojn enireblaj al laborulaj amasoj. Ĝi devos esti batalo por aplikigo de la plejbonaj metodoj de scienca instruado kaj por senpageco de la nutrado kaj flegado de ĉiuj infanoj.

II. INTERNACIO DE L' EDUKLABORISTOJ (PARIS)

7. Por efike bataladi por plibonigo de la materiala, jura kaj intelekta situacio de l' eduklaboristoj, estas necese grupigi ĉiujn landorganizojn el eduklaboristoj agantaj sur la klasbatala kampo en unu internacian organizon.

8. Tiu ĉi internacia organizo estas Internacio de l' edukistaro ekzistanta de 1920—22, de nun titolata: "Internacio de l' eduklaboristoj (Paris)".

III. TASKOJ DE L' INTERNACIO DE L' EDUKLABORISTOJ

Tiuj taskoj estas jenaj:

9. a) Kunordigado kaj kontrolo de la batalagado en la diversaj landorganizoj aliĝintaj al la internacia unuiĝo kaj priverkado de gvidlinioj por ĝia strategio kaj taktiko.

b) En ĉiuj landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas edukista organizo akceptanta ĉi suprajn principojn, estas necese veki klaskonscion meze de la profesiaj organizoj kaj konduki ilin al aliĝo al Internacio konforma je ties principoj.

c) Kolektante kaj publikigante materialojn pri materiala, intelekta kaj jura situacio de l' edukistoj el la diversaj landoj, pri lernejpolitiko de Ŝtato kaj pri la movado por la lerneja reformo, oni devos klare montri, ke kapitalismo, en ĉiuj landoj, kie ĝi superregas, sklavigas lernejon kaj edukistojn kaj ekspluatas ilin por sia profito.

d) Studado de l' demando pri senkonfesia (laika) unika (unusistema) laborlernejo.

e) Per publikigo de bultenoj, organizado de konferencoj, de diskutoj, de sciencaj ekskursoj, la diverslandaj edukistoj devos esti ligataj unuj kun la aliaj kaj oni organizos interŝanĝon de opinioj.

f) La internacia solidareco devos esti plifortigata per organizado de internaciaj edukistaj agadoj por subteni la diversajn organizojn kaj la Kamaradojn, kiuj batalas en aparte malfacilaj cirkonstancoj.

g) Interlige kun ĉiuj proletaj klasorganizoj, estas necese batali kontraŭ imperialismo kaj ĉiuj militdanĝeroj (minacoj), kaj ankaŭ kontraŭ internacia faŝismo.

IV. KONDIĈOJ POR ALIĜO

10. Povos aparteni al Internacio de l' eduklaboristoj ĉiuj naciaj organizoj akceptantaj jenajn principojn aŭ kies statutoj kaj agado harmonias kun ĉi principoj:

a) Klasbatalo por liberigo de laborista klaso.

b) Batalo kontraŭ imperialismo kaj militdanĝeroj, kaj ankaŭ kontraŭ tutmonda faŝismo.

c) Agnosko (rekono) kaj akcepto de l' internacia disciplino.

11. En landoj, kie ne ekzistas sekcio aliĝanta al Internacio de l' eduklaboristoj, oni povos akcepti aliĝon de izolaj membroj agnoskantaj ĉi suprajn principojn. Ili devos plenumi la propagandan laboron en la koncerna lando.

V. ORGANOJ DE L' INTERNACIO DE L' EDUKLABORISTOJ

12. Internacio de l' eduklaboristoj havas tri organojn:
    a) la Internacian Kongreson,
    b) la Ekzekutivan Komitaton,
    c) la Ĝeneralan Sekretariaron.

13. *Kongreso.*
    a) La Kongreso estas la superega organo de l' Internacio de l' eduklaboristoj kaj okazas ĉiujare.
    b) La Kongresoj fiksas la ĝeneralajn principojn de l' Internacio, difinas la sidejon de la ĝenerala sekretariaro, nomas ties membrojn kaj ankaŭ la aliajn membrojn de l' Ekzekutiva Komitato laŭ listo de kandidatoj elektitaj de la landsekcioj.
    c) La Kongreso elektas trimembran revizian komisionon, kies tasko estas kontroli la elspezojn de l' organizo kaj pri tio prezenti raporton al la Kongreso.
    d) Se neestas speciala decido de Kongreso, Ekzekutiva Komitato difinas lokon kaj daton de sekvonta Kongreso.
    e) Eksterordinaraj Kongresoj povos esti okazigataj ĉu de Ĝenerala Sekretariaro post decido de l' Ekzekutiva Komitato, ĉu laŭ propono de almenaŭ ⅓ el ĉiuj aliĝantaj sekcioj.
    f) Ĉiu sekcio rajtas en Kongreso unu aŭ kelkajn voĉojn:
       1 voĉon por malpli ol 1000 membroj,
       2 voĉojn por de 1001 ĝis 10 000 membroj
       3 voĉojn por pli ol 10 000 membroj.
    g) La izolaj membroj povos partopreni Kongreson kun konsila voĉo (ne decidrajta).

14. *Ekzekutiva Komitato.*
    a) La Ekzekutiva Komitato konsistas el 11 membroj: la 3 membroj el Sekretario kaj 8 membroj elektitaj de la Kongreso laŭ propono de speciala komisiono.
    b) La Ekzekutiva Komitato direktas la laboron de l' Internacio de iu Kongreso ĝis alia kaj estas priresponda antaŭ Kongreso.
    c) La Ekzekutiva Komitato kunvenas almenaŭ dufoje en jaro.
    d) La Kongreso elektas 7 anstataŭantajn membrojn por Ekzekuta Komitato.

15. *Ĝenerala Sekretariaro.*
    a) La Ĝenerala Sekretariaro konsistas el tri personoj: ĝenerala sekretario kaj du sekretarioj.
    b) La Ĝenerala Sekretario direktas la tutan laboron de l' Internacio laŭ la decidoj de l' Internaciaj Kongresoj kaj de l' Ekzekutiva Komitato. Li publikigas ĉiumonate la oficialan organon en tri lingvoj (germana, franca kaj angla) kaj reprezentas la Internacion kaj ankaŭ la Ekzekutivan Komitaton.

VI. KOTIZO

16. La kotizoj estas kolektataj de l' aliĝinta sekcio kaj sendataj ĉiutrimonate al la ĝenerala sekretario.

La kotizo estas 50 orcentimoj por membro de la sekcioj el almenaŭ 10 000 membroj; 5% el la kotizo sekcia kun minimumo de 1500 orfrankoj por la sekcioj el 10 000 membroj kaj pli.

VII. INTERNACIA KASO POR BATALO KAJ SOLIDARECO

17. Por daŭrigi efike la batalon por plibonigo de la materiala kaj jura situacio de l' eduklaboristoj, kaj ankaŭ kontraŭ ĉiuj atakoj celantaj edukistojn, la Ekzekutiva Komitato organizos detaleme internacian kason por batalo kaj solidareco, tamen ne administratan de la Ĝenerala Sekretario.

VIII. BULTENO

18. Internacio de l' Eduklaboristoj publikigas ĉiumonate sian bultenon en tri lingvoj (germana, franca kaj angla).
19. Ĉiu sekcio komisias membron el sia Ekzekutiva Komitato por rilati kun la Ĝenerala Sekretario; tiu membro prezentas ĉiudumonate raporton al la Ĝenerala Sekretario kaj al sia Ekzekutiva Komitato kaj specialan raporton, se urĝas.

IX. EKSIGOJ EL LA INTERNACIO

20. La sekcioj, kiuj ne aplikas la kongresdecidojn aŭ ne plenumas la instrukciojn de la Ĝenerala Sekretario, estas eksigataj laŭ decidoj de l' Ekzekutiva Komitato. Por tio necesos ²/₃ el la voĉoj de l' Ekzekutiva Komitato.
21. Se la decidoj de l' Internacio ne estas aplikitaj de l' organoj de landa sekcio, la Ekzekutiva Komitato sin turnos al la membroj de la koncerna sekcio, eventuale okazigos landan konferencon, klopodos solvi la ekzistantan konflikton. Nur kiam landa konferenco estos espriminta sian opinion pri la demando staranta, povos la Ekzekutiva Komitato decidi eksigon.
22. La Ekzekutiva Komitato povos eksigi ankaŭ izolajn membrojn.
23. En ambaŭ okazoj (eksigo de landsekcio aŭ de izola membro), la Kongreso sekvonta povos konfirmi aŭ nuligi la decidon de l' Ekzekutiva Komitato.

NOTO

Paragrafoj *a)* kaj *d)* de l' artikolo 14 estis modifataj dum kongreso Pariza-Brusela (aŭg. 1925).

Art. 13 b) und 16 estis modifataj dum Viena Kongreso (aŭg. 1926).

Ĉi supra statutaro estas korektita laŭ ĉi supraj modifetoj kaj validas de 1926. La adreso de la sekretariejo estas jena:

Internationale des Travailleurs de l'Enseignement

L. Vernochet, 8 Avenue Mathurin-Moreau, Paris XIX.

Internacio de l'eduk-laboristoj

(Rapida Historia Skizo)

La Internacia Oficejo de l' instruistaj organizoj

La unuaj internaciaj kontaktoj inter edukistoj okazis je la fino de la lasta jarcento en Svisio (1872 kaz 1874), en Belgio (1880), en Francio (1885 kaj 1890). Dum la mondekspozicio en *Liège* (Ljeĵ', Belgio), la Ĝenerala Belga Geinstruista Ligo aranĝis internacian popollernejan kongreson en kiu oni decidis fondi konstantan *Internacian Oficejon de la Geinstruistaj organizoj (1908).* Ĝia sidejo estis en *Bruselo.*

Ĝis la mondmilito, Internacia Oficejo de la geinstruistaj organizoj faris preskaŭ nenion. Krom la *Belga Instruista Ligo,* aliĝis la *Nacia unuiĝo Instruista el Britio,* iu *Nederlanda Instruista Asocio,* la *Germana Instruista Ligo,* kaj la *Federacio de la Francaj instruistaj amikaroj,* entute 390 000 membroj. La juna organizo estis sufokita de siaj estroj en la frenezecaj tagoj antaŭ la milito kaj post la mondbuĉado venenita atmosfero ĉirkaŭis ankaŭ la oficejon. La Brita *Nacia unuiĝo Instruista* petis la sekretarion, *Cnudde* (belgo) reorganizi la oficejon sur la antaŭmilita bazo, sed li fiere respondis, ke li "*ne volas sidiĝi ĉe la sama tablo kun germanaĉoj*". Britoj tiam sin turnis al Ameriko, kie naskiĝis blufa entrepreno pri mondunuigo tutedukistara sub morala kaj financa subteno de l' usona kapitalismo ... pri kiu ni reparolos.

Mortis Internacia Oficejo de geinstruistaj organizoj, kvankam Cnudde daŭrigis aperigi informojn pri ĝi en diversaj oficialiaj jarlibroj kaj deziris ĝin reorganizi sub la protekto de Ligo de Nacoj — en tempo, kiam Germanio staris ekstere. Naŭzinte ĉiujn, ĉefe la centr-eŭropajn instruistarojn, ŝoviĝis vole ne vole la Internacia Oficejo sur "flankajn relojn", kie ĝi troviĝas nun, tute senmova, tute rustiĝinta.

Stariĝo de Edukintern

La "fera pugno" de la milito skuegis la edukistaron, kies unu parto svenis en plej malkuraĝa silento kaj alia parto ribele protestegis. Dum la pacifistaj edukistoj el la "venkintaj" landoj mutiĝis ĉar terure efikis la opio de la glora kaj trompa venko — dum en Centra Eŭropo laboristaj revolucietoj liberigis parte kaj provizore la instruistarojn el la jugo de l' aŭtoritata principo ŝtata kaj religia (kvankam la instruist-amaso poste ne dankis al Proletaro per aliĝo al proletara movado) — dume, en blankteroraj landoj, Finnlando, Hungario, Jugoslavio, kaj ĉefe Bulgario, kaj en faŝismaj Italio kaj Hispanio, parto de l' edukistoj kontaktiĝis kun la nudigita veraĵo pri l' ekspluatemo, trompemo, sklavigemo de siaj fi-regantoj, milope partoprenis la ribelojn kaj centope estis monpunitaj; malliberigitaj, turmentitaj, ekzilitaj, dronigitaj, pafmortigitaj aŭ pendigitaj.

Tamen estas en unu el tiuj demokratiaj landoj, kie la refirmiĝanta burĝaro sukcesis ĉefe dank' al opio de la "militista venko" sufoki la revoluciajn ondojn, en demokratia Francio, kie ekŝprucis la fajrero de l' internacia edukista movado. Kvankam iom pli evoluiĝinta ol en aliaj landoj, la instruistaro en Francio, kiu antaŭmilite partoprenis kaj venkis en la batalo por la senkonfesia lernejo, restis ĝenerale senmova kaj obeema al respublika kaj imperialisma registaro. Sed fervorega malplimulto, spertiĝinta dum la antaŭmilitaj luktoj, netrompita de la ŝajne progresema senkonfesia burĝaro reganta, hardiĝinta en la kontraŭmilitemo de l' antaŭmilita sindikalismo eliĝis el la milito furioze revoluciema.

Dum la tuta milito, la Franca "*Federacio de l' Edukistoj*" senĉese, kaŝe kaj malkaŝe, kontraŭbatalis la militon. Ĝia organo, "*Emancipa Lernejo*" estis la sola franca gazeto, kiu kuraĝis protesti dummilite kaj sinmontri rigore pacifista. Pro pacifista agado, dummilite, sindikataj instruistinoj kaj instruistoj estis ĵetataj malliberejon kaj postmilite dekope persekutataj kaj senoficigataj.

La Federacio de l' Edukistoj, inspirita de plej alta idealo kontraŭmilita kaj de realisma sindikalismo jam antaŭmilite revolucia, aŭdigis en 1919 la unuan vokon por starigo de Edukista Internacio. Dum edukista *kongreso en Tours* (aŭg. 1919), fama pensulo *Anatol Frans'* laŭtigis ĉi parolojn, kiujn Edukintern disaŭdigis tra tutmondo kaj ekaplikis:

> "Bruligu, forbruligu ĉiujn librojn, kiuj lernigas malamon... Mi deziras, mi deziregas tutkore, ke al la Laboristara Internacio baldaŭ aliĝu delegacio de la ĉiunaciaj instruistoj por kune prepari universan instruadon kaj pripensi la eblon semi en la junajn animojn la ideojn, el kiuj naskiĝos la monda paco kaj la unuiĝo de la popoloj... La unuiĝo de la laboristoj estigos la pacon de l' mondo".

En fino de sama kongreso, K-dino *Marthe Bigot* (Mart' Bigo') la unua, iniciatis fondon de *Edukista Internacio* kaj skizis en rezolucio ties ĝeneralan agadplanon. Sed Edukintern naskiĝis nur la postan jaron dum *Kongreso en Bordeaux* (Bordo', aŭg. 1920), kie ĉeestis K-dino *Zanetta,* delegitino de la *Itala Instruista Sindikato.* Oni elektis kiel sekretariojn, K-dojn *Briard* kaj *Vittecoq* (ĉi lasta ĉar esperantisto) — kaj post kelkaj monatoj stariĝis ses landaj sekcioj: *franca, itala, germana, hungara* (rifuĝintoj en Ĉeĥoslovakio), *nederlanda, hispana.* Poste aliĝis sekcioj *luksemburga, belga, portugala, rusa, ĉina* kaj *skota.*

Do, Edukintern naskiĝis kun protestega krio kontraŭ la milito kaj kontraŭ ĝia kaŭzanto: ĉiulanda kapitalismo.

Estas koincido interesa kaj komprenebla, ke samepoke en amerika kontinento, alia granda pensulo luktanto kontraŭ la usona imperialismo eksentis la historian necesecon de internaciista ligiĝo de l' edukistoj sur tutmondo. *Upton Sinclair* kriis veraĵon al geinstruistoj, kiel konkludon al sia verko fama "The Goslings" *(La Anseridoj):*

> "Edukisto estas laboristo, utila laboristo, kaj la lukta loko de l' edukisto estas apud ĉiuj liaj klasfratoj. Eduklaboristoj de l' mondo unuiĝu. Vi povas perdi nenion krom viaj ĉenoj kaj vi la mondon nur gajnos."

De sia fondo, Edukintern' senĉese denuncis la militemon ĉie, kie ĝi kaŝiĝas, en lernejo kaj aliloke — kaj ne ĉesas organizi la defendon de la postuloj kaj rajtoj de l' eduklaboristoj en ligo kun la cetera Proletaro. Tiel, Edukintern' ne lacigeble iras la du celojn, belvortigitajn de la du famaj proletar-amikaj verkistoj Anatole France kaj Upton Sinclair: rigore kontraŭmilitan porpacan edukadon de l' infanaro kaj decide klasbatalan sindikalisman agadon de l' tutmonda instruistaro.

La Mondfederacio de Edukasocioj

Ĉar Eŭropa pacifismo devis postmilite tute silenti aŭ nur timeme paroli en la akriĝinta socia batalo, burĝa ordo tre timis ke la edukistoj aliĝu al movado batalema kaj klarcela. Eŭropa burĝaro ankoraŭ ne povis krei la cirkonstancojn, kiuj rekte atakos Edukinternon provante disigi ĝin. Sed usona kapitalismo, la postmilite plej potenca, observadis la mondsituacion. Sur la eduka fronto ankaŭ, ĝi konsciis la neceson helpi al Eŭropa kapitalismo reorganiziĝanta. Tiel estas, ke en ĝia influsfero naskiĝis la ideo de la usona Nacia Asocio Edukista fondi tutmondan federacion de edukasocioj kun pacifisma bazo laŭ la kompreno de la usona registaro.

Laŭ amerikaneca reklamo, la usona Asocio superŝutis la tutmondon edukistan per alvokoj kaj invitiloj por fonda kongreso en *San Francisco de la Mondfederacio de Edukasocioj* (1923). Riĉa burĝo el Usono donacis unu milionon da dolaroj al la nova mondfederacio. Tiu bela donaco de kapitalisma filantropo karakterizas la burĝan edukistan *internacion de San Francisco.* Imperialisma produktaĵo ĝi nur estas, sub altpaca masko, la "plilongiga aranĝo" al la kapitalistara internacio. Ĝi sukcesis akiri ian influon en Japanio, Ĉinio, Indio ĉe koloraj edukistoj tre obeemaj al sia imperialisma regado kaj allogitaj de l' belvortoj de Wilson'ecaj naivuloj. Sed Eŭropaj edukistoj, spertinte la militon, sin tenis for. Vundita ŝovinemo de l' unuj opiniis tiun pacifismon maloportuna; arda revoluciemo de l' aliaj opiniis ĝin mensoga.

Dum 1925, en *Edinburg,* la mondfederacio provis sin trudi al Eŭropa edukistaro. Multa bruo, nenia sukceso.

Kvankam staranta laŭstatute "*ekster politiko kaj religio*", la Mondfederacio sin elmontras la edukilo kaj edukist-formilo de l' religieca usonangla kapitalismo, kies kultura reprezentanto, iu altgrada pastro benis en Edinburg la tutan kongresanaron.

Malsukcesis la entrepreno de Mondfederacio en Eŭropo: Edukistoj centr-eŭropaj (ne apartenantaj al Entento) atendis pli realan kaj urĝan solvon de la pacproblemoj kaj sentis la atakojn kontraŭ Germanio kaj Rusio. La tria kongreso projektita en Stokholmo, okazis... en Toronto (1927).

Sed tiu rezigno pri agado en Eŭropo koincidas kun tute favoraj cirkonstancoj por Eŭropa burĝaro, kiu sukcesis en lastaj jaroj trovi helpantojn en eŭropaj pacifistaj edukistaroj por atingi la celon de l' tutmonda burĝaro: konkurenci, disigi kaj sufoki *Internacion de l' Eduklaboristoj.*

Federacio Internacia de l' Asocioj Instruistaj

En junio 1926, sub iniciato de franca *Nacia Sindikato,* konstruiĝis la unua ŝtupo de tiu pacifista organizo per fondo de *pedagogia interkonsento franca-germana* kun la nesindikata *unuiĝo de la germanaj instruistoj.* Dum septembro 1926, aliaj traktaĵoj okazis kun la *Brita Nacia Ligo Instruista* ankaŭ ne sindikata, en Parizo ĉe Internacia Instituto de Intelekta Koopero kaj per tio jam aperas la favoro de Ligo de Nacioj, kaj la brita ligo aliĝis al la pedagogia interkonsento dum novembro. Fine dum aprilo 1927 okazis la fonda Konferenco de FIAI en *Londono,* kun partopreno de franca, angla, germana, holanda, sveda kaj baltlandaj organizoj. Samtempe en Praha, okazis konferenco "Paco per Lernejo" organizita de Instituto J. J. Rousseau sub duonoficiala protekto de Ligo de Nacioj, ĉeesto de eminentaj pacifistaj pedagogoj kaj registaraj reprezentantoj, kaj kompreneble okazis interŝanĝo de salutleteroj inter ambaŭ konferencoj.

Tiu nova internacio, kiun oni povas alnomi "Internacio pedagogia pacifista de Londono", tute ne estas proleteca aŭ klasbatala. Laŭstatute, "ĝi celas nur pedagogian kunlaboron kaj preparon de mondpaco per komuna laboro de la popoloj" (art. 1), "ĝi ne postulas promesdevigon por politika aŭ socia formulo (art. 2), "ĝi estas konvinkita, ke la edukado de l' infanoj de ĉiuj landoj al reciproka interkompreniĝo de la popoloj, estas la nepre necesa premiso de daŭra paco" (art. 3).

Tiel, 8 jarojn post la milito, kiam eŭropa kapitalismo refirmiĝis sufokinte revoluciajn ekmovojn, kiam tutmonda imperialismo sin preparas al novaj militoj, tiam postmilita *novpacifismo* de l' edukistoj fine ekaŭdigas sian trankvilan voĉon kaj faras sian unuan paŝon al internacia organiziĝo. La edukistaj ŝafoj celas atingi pacon per "eduko de l' infanoj" kaj "pedagogia kunlaboro de l' instruistoj" kaj por tio ili paŝtas sin sur neŭtrala kampo

DE BORDEAUX ĜIS LEIPZIG

Okjara Laboro

En *Bordeaux* (aŭg. 1920) ĝermis Edukintern ĉe kongreso de franca "Instruista Federacio", kiun ĉeestis ununura alilanda delegitino, itala K-dino Zanetta. Vigle laboris la du unuaj sekretarioj Vittecoq kaj Briard, verkis la unuan regularon de la t. n. "Edukista Internacio" sur unueca, klasbatala kaj eduke kontraŭmilita bazo kaj varbis ses landsekciojn.

En *Paris* (aŭg. 1922) okazis la definitiva starigo. La kongreson ĉeestas delegitoj el 5 sekcioj kaj izoluloj el kelkaj aliaj landoj. Dum du jaroj, la kreskado de Edukintern daŭras dank' al francaj Gekamaradoj Bouet, Testud, Boubou, Boyer, Bernard, Boutreux, Eugénie Beaumont, kies nomoj fiksiĝos al memoro pri tiu heroeca periodo.

En *Bruxelles* (aŭg. 1924) oni konstatas kaj definitivigas aliĝon de 4 novaj sekcioj (belga, portugala, bulgara, soveta), unua impona kongreso pro la multeco de la landoj reprezentitaj. Sub premo de la novaj sekcioj ĉefe de la belga, Edukintern alprenas ne nur klasbatalan kaj kontraŭmilitan lernejbatalan bazon, sed ankaŭ vere sindikalisman bazon, etendante la agadon al profesia defendo de la instruistaj rajtoj kaj interesoj. Novan regularon pli firman kaj precizan oni starigis. La nomon "Edukista Internacio" oni ŝanĝis per pli proleta "Internacio de l' Eduklaboristoj". La Brusela kongreso (1924) montris novan etapon en la vivo de Edukintern. Ĝi finis la infanan periodon kaj *finorganizis* la Internacion laŭ la postuloj de maturiĝanta, ĉiam kreskanta organismo.

En *Parizo* kaj *Bruselo* (aŭg. 1925) — franca demokrata registaro rifuzis enirpermeson al rusaj delegitoj; tial la kongreso devis finiĝi en Belgio; ĉeestas delegitoj el 7 landsekcioj kaj partoprenantoj el 15 landoj. La raporto de la sekretario pruvas agadon sur tutmondo. Afriko kaj Azio estas reprezentataj de indiĝenaj instruistoj el francaj kolonioj (Nord-Afriko, Anamo). Ekrilatoj okazas kun edukistoj el Nord- kaj Sud-Ameriko, Nederlanda Indio kaj Ĉinio. En tiu internacie solidara atmosfero, oni voĉdonas gravan rezolucion favore al sindikalisma unueco kaj atingas altan ŝtupon en la eterna diskuto pri "klaseduko" per unuanima interkonsento koncerne la evidentan sociklasan karakteron de lernejo sub kapitalismo. Samtempe du delegitaroj el okcidentaj geinstruistoj vizitas Sovetion sub patronado de Edukintern kaj raportas pri rusa lernejo.

En *Vieno* (aŭg. 1926), Edukintern pruvas sian potencon per amasa kongreso, kiu naskas entuziasmon ĉe aŭstria Proletaro kaj trudas aŭstrian reakcian registaron nuligi la enir-malpermeson al rusaj delegitoj. La disigemaj provoj, de kongresa tribuno, estas kondamnataj de du konataj Amsterdamanoj: K-doj *Clément* (Luksemburgo) kaj *Peters* (Belgio) — ambaŭ kongresprezidantoj. Tre emociiga estis la momento, kiam Peters mem bonvenigis

---

ekster politika socia batalo, meze de la lupoj de kapitalismo kaj imperialismo.

Firme bazita sur klasbatalo, unuiganta ĉiutendencajn proletedukistojn, Edukintern denuncas la danĝeran iluzion pacifistan. En publika letero al Konferenco "Paco per Lernejo" ĝi deklaris:

"Nek infano, nek edukisto donos pacon al mondo, sed armita pugno de Laboristoj."

Edukintern memorigas la parolojn de Jaurès: "Kapitalismo naskas militon same, kiel nubo naskas ŝtormon". Por venki militon, malsufiĉas edukado, necesas mortigi kapitalismon. *M. Boubou.*

rusajn delegitojn Korostelef kaj Apletin, deklarante, ke lia bonvenigo estas simbolo pri unueco ekzistanta en Edukintern. La pasiaj diskutoj pri: Lernejo kaj Moralo; Lernejo kaj religio, Batalo kontraŭ ŝovinismo kaj Imperialismo, finiĝis per rezolucioj klaregaj, nehipokritaj, energiaj, esprimantaj la progresojn de revolucia filozofio en la sekcioj de Edukintern'. En Vieno estis mondkongreso: preskaŭ ĉiuj eŭroplandoj estis reprezentataj, ankaŭ Afriko, Azio kaj Usono (ĉi lasta de K-dino Dorothy Gary).

De Viena kongreso ne ĉesas la progresoj de Edukintern'. En Pasko 1927 aliĝas la *Asocio de Skotaj Socialistaj Edukistoj;* en majo *instruistoj el ĉina provinco de Hupe*. Ĝis nun en 10 landoj ĝi havas sekciojn laborantajn; aliflanke grupoj el izolaj aliĝantoj ekzistas preskaŭ ĉie. Entute proksimume 800 000 membroj.

En *Leipzig* (Paskon 1928) okazos *Internacia Pedagogia Semajno* de Edukintern'. Tie, de Internacia tribuno, la ĉefproblemoj pri infano kaj edukisto, paco kaj lernejo estos diskutataj je lumo de klasbatalo kaj la pacifistaj pedagogoj estas invitataj por libere defendi siajn mildajn metodojn de religia, politika, socia neŭtraleco kaj de kunlaboro kun imperialismo. Edukistoj el tuta Eŭropo, iru Leipzigon.

Tradukis: SAT 518. *L. Vernochet.*



Situacio de prolet-infanoj en Japanio kaj Ĉinio

resumo de raporto prezentota en Leipzig

de *T. Oki*

Malsamas la formoj de kapitalisma industrio en Japanio kaj en Ĉinio. En Ĉinio, la nuna ekonomio sin bazas sur la internacia financa kapitalo dum en Japanio okazis stranga kunfandiĝo de l' imperialismo kun postrestaĵoj de l' absolutisma ŝtato. Sed komunaj karakterizoj de kapitalisma ekonomio en ambaŭ landoj estas: 1. la terurega ekspluatado de l' infan-laboro; 2. la nesufiĉo kaj eĉ manko de iu ajn leĝo protektanta la infanojn.

Oni povas aserti, ke en Japanio kaj Ĉinio bazo de kapitalismo konsistas preskaŭ nur el ekspluatado de geknaboj. Komence, en industrio kapitalista partoprenis infanoj kaj junuloj laŭ proporcio atinganta 50% el tuta Laboristaro.

En tuta Ĉinio oni ne trovas postsignon de laŭleĝa limigo de l' ekspluatado de l' infanlaboro. Tial, labortago estas eksterordinare longa kaj salajro eksterordinare malalta. En fabrikoj, ĉefe en ŝpinejoj, laboras, tage kaj nokte, dum 12 ĝis 14 horoj, infanetoj ofte ankoraŭ ne naŭjaraj.

Estas vere, ke en Japanio ekzistas protekta leĝo malpermesanta laborigi en la fabrikoj infanojn ne ankoraŭ 13-jarajn, sed alia leĝarangô permesas uzi 11-jarajn infanojn, kiuj finis la elementan lernadon aŭ kiuj vizitadas la fabrik-lernejon. Labortago de 13-jaruloj ne devas daŭri pli ol 16 horojn. La nokta laboro estos malpermesita de 1930 por infanoj malpli ol 15-jaraj.

Ĉar laboristoj kaj kamparanoj el Japanio konsciis, ke la oficiala instruado estas nur premeg-aparato de reganta klaso, ili provis fondi proprajn lernejojn, sed la ŝtato monopoligis la instruadon kaj ĉian formon de proleta lernejo oni malpermesis. Dum epoko de strikoj, manifestoj, persekutoj kaj arestoj, la strikantoj rifuzis sendi siajn infanojn al la ŝtatlernejo kaj provis ilin instrui en proletaj lernejoj; sed la registaro malpermesis ĉiun lernejan strikon kaj rajtigis la provincestrojn enkarcerigi dum-ĝis 50 tagoj ĉiun, kiu instigos lernejan strikon.

Plie, la militista instruado fondita en julio 1926 devas estigi la junan japanan proleton 16- ĝis 25-jaraj soldato fidela al ŝtato.

antistaj dum fondiĝis "*Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj*" (1922). Tiu asocio (TAGE) estis kompromiso de l' amikoj de "NT" celanta: vivigi la gazeton kaj regrupigi la tute disiĝintan esp. edukistaron sur bazo progresema kaj rigore pacifisma, hardante ĝin al internacia batalo. Bedaŭre Saksa Ligo pro malfavoraj cirkonstancoj politikaj ne povis rapidigi sian proletiĝon. "Novaj Tempoj" fariĝis "Internacia Pedagogia Revuo", kiu montras pli kaj pli burĝpacifisman tendencon kaj sin direktas sur vojo al ligo kun Internacia Eduk-Oficejo el Ĝenevo kaj Pedagogia Pacifista Internacio de Londono.

SAT, SAT-edukistoj kaj Edukintern

Esperanta movado nepre sekvas ĝeneralan socian movadon. SAT-edukistoj devas sin turni al Edukintern, la nura organizo de la klaskonsciaj edukproletoj. La ĵus kreita pedagogia serio de "S. R." estu ligilo ankaŭ kun Edukintern. El 500 SAT-edukistoj, preskaŭ 200 apartenas al landoj, kie ne estas Edukinterna sekcio. Ili helpu al Internacio de l' Eduklaboristoj penetri ĝis plej malproksimaj lokoj.

Kvankam aliĝinta nek al Amsterdama, nek al Moskva internacioj (pro unuecema taktiko — sed nepre aliĝonta unikan laboristan internacion), Edukintern kunlaboras kun ĉiuj proletaj organizoj. Kun Internacio de Milit-viktimoj, kunlaboraj rilatoj jam efektiviĝis. Problemo pri eduko kaj paco, batalo kontraŭ imperialismo kaj militminacoj koncernas tutan Proletaron. SAT-Kamaradoj, ankaŭ ne edukistoj, vi do ankaŭ rilatu senpere al Edukintern, informante pri ĉiuj lernejaj aŭ nelernejaj aferoj, en kiuj precipe proletedukistoj povas batali.

Kaj vi, SAT-edukistoj, eniru vian internacian klasorganizon, anoncu vin al vialanda sekcio aŭ, kiel izolulon, al la ĝenerala sekretariejo de l' Internacio de l' Eduklaboristoj. Helpu per esperanto ĝian agadon. Partoprenu ĝiajn kongresojn. Estu la bezonata cemento unuigonta praktike la samklasajn, sed diverslingvajn mondedukistojn. Ni formu per nia SAT-edukista sekcio, flanke de nia Internacio el landgrupoj nacie laborantaj, la unuan "kernon" el Edukinternanoj-unuopuloj, efektive, sennacie, mondskale kaj tute senpere agantaj.

La Redakta Komitato.

Tutmonda Esperanta Pedagoga Servo

Sekretario:
M. Boubou, 96, rue St-Marceau, *Orléans*-Francio.
Liveras senpage al siaj kunlaborantoj monatan bultenon kaj esp-resumo de "Vojo de Klerigo".
K-doj, kunlaboru per monata artikolo, kaj tiel vi utilos al la edukista gazetaro avangarda kaj al

Internacio de l' Eduk-laboristoj

I. T. E.

INTERNATIONALE DES TRAVAILLEURS
DE L'ENSEIGNEMENT
INTERNATIONALE DER BILDUNGSARBEITER
EDUCATION WORKER'S INTERNATIONAL
ИНТЕРНАЦИОНАЛ РАБОТНИКОВ ПРОСВЕЩЕНИЯ

INTERNACIO DE L'EDUK-LABORISTOJ

estas la sola organizo internacia de klaskonsciaj
edukistoj el mondo



SAT-edukistoj
aliĝu sekcion de Edukintern en via lando;
anoncu vin al sekretario en Parizo.
Per esperanto helpu!



Internationale des Travailleurs de l'Enseignement
L. Vernochet, 8 Avenue Mathurin-Moreau, Paris XIX.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)